



ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha II, Malá Štěpánská 7. — Redaktas Dr Stan. Kamarýt.

Adolf Malík: Mírové hnutí ve světě La porpaca movado en la mondo

V této době jde celým světem vlna hnutí za světový mír. Tohoto hnutí se účastní všechny pokrokové složky. Je samozřejmé, že esperantisté nemohou zůstat pozadu, a jsme přesvědčeni, že všechny národní svazy a spolky esperantské učinily již svá prohlášení za mír. Esperantisté se mohou vyvíjet jen v míru; ke své práci potřebují mír, a proto musí tento mír bránit vždy a na každém místě, tiskem, rozhlasem, přednáškami, osobním přesvědčováním, v korespondenci, zkrátka všude tam, kde narazí na nepřátele míru. Toť jedna ze základních povinností každého esperantisty na světě: hájit mír, hájit pokrok, hájit si své právo na klidnou práci v esperantských klubech.

Myslenku míru musíte proto vnést do všech esperantských klubů, tam musíte debatovat o tom, kdo ruší světový mír, kdo jsou jeho úhlavní nepřátelé. Čtete v klubech naše Esperanto-Servon, poslouchajte naše esperantské vysílání, čtete listy svých pokrokových stran a spolků, a dovíte se, kdo jsou rušitelé světového míru. Dovíte se, že země lidové demokracie, že velký Sovětský svaz, že pokrokové lidi v kapitalistických státech, že nově zrozená velká Čína, že lid svobodné demokratické republiky Východoněmecké jsou jediní opravdoví zastánci míru, míru nedělitelného, bez něhož trpí lidská důstojnost, trpí jednotlivci, ale též celé národy. Jistě se již mnohý z vás chystá na světový esperantský kongres do Paříže. Ale nevím, zdali jste si již položili otázku o významu takového kongresu v době boje o mír. Tento kongres je jedinečnou příležitostí k mezinárodní manifestaci za světový mír. Sejdou se tam zástupci 50 i více národů, bude to jistě počet až 2000 účastníků, a bylo by neodpustitelnou chybou všech esperantistů světa, kdyby z tohoto kongresu neměla vzejít mohutná resoluce, vyjadřující touhu udržeti světový mír a spolupráci mezi národy. Na tomto kongresu musí zazníti letos mohutněji než kdy jindy naše esperantská hymna, naše píseň míru, a z tohoto kongresu musí být zaslány dopisy všem vládám, že esperantisté všech zemí žádají mír pro všechny národy, žádají svobodu všem národům, bez rozdílu ras, národností a náboženství. Tento pařížský kongres se musí stát naším nejslavnějším kon-

En la nuna tempo iras tra la tuta mondo potenco ondo de la movado por tutmonda paco. En tiu ĉi movado partoprenas ĉiuj progresemaj elementoj. Evidente la esperantistoj ne povas resti flanko, kaj ni estas konvinkitaj, ke ĉiuj naciaj asocioj kaj Esperanto-societoj faris jam siajn porpacajn deklarojn. La esperantistoj povas disvolviĝi sole en paco; por sia laboro ili bezonas pacon, kaj tial ili devas defendi la pacon ĉiam kaj ĉiuloke, per gazetaro, radiodisaŭdigoj, paroladoj, persona konvinkado, korespondado, unuvorte ĉie, kie ili renkontas malamikojn de la paco. Jen unu el la fundamentaj devoj de ĉiu esperantisto: defendi la pacon, defendi la progreson, defendi sian rajton pri kvieta laboro en Esperanto-klubo.

La ideoj de paco vi sekve devas enporti en ĉiujn Esperanto-klubojn, tie vi devas diskuti, kiu malhelpas la pacon, kiuj estas ties ĉefmalamikoj. Legu en la kluboj nian Esperanto-Servon, aŭskultu nian esperantlingvan radio-programon, legu la gazeton de viaj progresemaj partioj kaj societoj, kaj vi sciigos, kiuj estas la malhelpantoj de la tutmonda paco. Vi sciigos, ke la landoj de popol-demokratio, ke la granda Sovet-Unio, ke la progresemuloj en la kapitalistaj ŝtatoj, ke la ĵus naskiĝinta granda Ĉinujo, ke la popolo de la libera Demokrata Respubliko Orient-Germana estas la solaj veraj defendantoj de la paco, de paco nedividebla, sen kiu suferas la homa digno, suferas unuopuloj, sed ankaŭ tutaj nacioj. Certe jam multaj el vi preparas vin por partopreni en la Universala Esperanto-Kongreso en Parizo. Mi tamen ne scias, ĉu vi demandis vin mem, kia estas la signifo de tia kongreso en la tempo de porpaca batalo. La dirita kongreso estas unika okazo al internacia manifestacio por tutmonda paco. Kunvenos tie reprezentantoj de pli ol 50 nacioj, sume ĉe estos proksimume 2000 partoprenantoj, kaj estus nepardonebla eraro de ĉiuj esperantistoj de la mondo, se el tiu ĉi kongreso ne elfontus impona rezolucio esprimanta la sopiron konservi la tutmondan pacon kaj internacian kunlaboron. En tiu ĉi kongreso devas pli potence ol iam ajn eksoni nia Esperanto-himno, nia kanto de paco, kaj el tiu ĉi kongreso oni devas sendi leterojn al ĉiuj registaroj, ke la esperantistoj de ĉiuj landoj postulas pacon por ĉiuj nacioj, ke ili postulas liberecon por ĉiuj nacioj, sen konsidero pri la raso, nacieco kaj religio. La dirita Pariza kongreso devas fariĝi nia kongreso plej glora, per kiu la

Přihlásil jste se již na

VIII. SJEZD ĈS. ESPERANTISTŬ V BRNĚ?

Účastníci mají 33% slevu na dráze.

Všechny informace, přihláška a složenka v minulém čísle. Viz též stranu 31 tohoto čísla.

gresem, jímž esperantisté ukáží také praktickou cenu esperanta v boji za ušlechtilé myšlenky, jako jsou mír a svoboda, právo a spravedlnost, nárok na slušnou životní úroveň a nárok na práci a vzdělání nejen bílých, ale i barevných národů. Jedině tímto kategorickým požadavkem, který bude vznesen na pařížském kongresu, budeme plnit odkaz velkého tvůrce esperanta dra Zamenhova, který ukládá všem esperantistům bojovat za mír ve světě. Uvšdomováním širokých lidových mas lze mír zachrániti, a proto požádejte veřejné přednášky na thema: „Esperantisté pomáhají v boji za světový mír“. Jsem přesvědčen, že i tato naše drobná práce je velmi užitečná pro věc míru, o němž se musí mluvit a pro nějž se musí v esperantských klubech pracovat. Váleční štváči připravují novou, ještě strašnější válku, aby zachránili své obrovské příjmy z válečných zisků, aby mohli ještě více zotročiti lid v každé zemi. Jejich internacionalismus mamonu je nezastaví před žádným zločinem, a proto se lid všech zemí musí proti nim postavit v semknutých řadách, a v těchto řadách nesmějí esperantisté chyběti. — Dávejte podněty k mírovým akcím v každé vesničce, v městech, v továrnách a na závodech, organizujte manifestační průvody za mír, připravte mohutnou manifestaci s průvodem po ulicích Paříže v době světového esperantského kongresu. — Když toto všechno budete činit, splníte jen svoji povinnost esperantisty a zasloužíte se o budování míru ve vaší vlasti, a tím i v celém světě. Bude to zároveň neplodnější práce pro esperanto, pro esperantisty všech zemí.

Propono de Esperanto-stenografio

Al nia Esperantista publiko, speciale al samideanoj, sciantaj stenografion de sia nacia lingvo, mi prezentas stenografian sistemon por Esperanto, kompilitan laŭ la ĉeĉoslovaka sistemo de Herout-Mikulik.

La diferenco inter la ĉeĉa kaj Esperanta lingvoj en la litera strukturo ne estas malgranda. Tial la ŝanĝoj, faritaj en la sistemo de Herout-Mikulik, estas ofte fundamentaj. La sistemo estas ĉi tie prezentata sole per plej necesaj ekzemploj kaj klariga teksto, kaj estas klare, ke la tuta necesa skribmaterialo ne estas elĉerpita. Mi tre ŝatos ricevi kritikojn kaj sugestojn de interesitoj, laŭ kiuj mi klopodos plibonigi la sistemon, se ĝi trovas nur iom vastan rondon de interesatoj. Ankaŭ mi ŝatos ricevi de samideancj tekstojn, skribitajn per mia sistemo. Laŭ deziro mi korektos ilin kaj resendos kontraŭ reafranko.

Podvrší 731,

Ostrava-Radvanice.

Adolf Staňura.

Generalaj reguloj.

Paĝo 1.

La stenografiaj signoj estas skribataj en 4 linioj: 1) baza linio, 2) meza linio, 3) supra linio, 4) malsupra linio. La spaco inter la linioj 1) — 2) estas 1 ŝtupo, inter la linioj 2) — 3) kaj 1) — 4) estas 1½ ŝtupo. Meze inter la linioj 1) — 2) estas supozata dividita linio.

Majuskloj ne ekzistas, proprajn nomojn kaj titolojn de artikoloj oni laŭbezone povas substreki.

Punkto post frazo estas skribata kiel mallonga horizontala streketo sur la baza linio, ĝia longeco estas proksimume ½ ŝtupo. Aliaj signoj (komo, demand-, voksignoj ktp.) restas laŭbezone kiel en la ordinara skribo.

Se iu signo elvicigiĝas, oni supozas novan bazan linion ĉe ĝia malsupraĵo, kaj laŭ tiu ĉi supozata linio oni traktas la sekvantajn signojn de la vorto.

Se vorto povas esti skribata kelkmaniere, oni uzu ĉiam la plej rapidan kaj skribŝparan manieron. Por certaj litergrupoj estas proponitaj diversaj mallongigoj. Se per uzo de tia mallongigo estiĝus dusencaĵo aŭ neklaraĵo, skribu precize laŭtere.

La substantiva finaĵo „o“ povas esti ellasata. Se estas necese, skribu apostrofon kiel normale.

Multaj aliaj detaloj estas evidentaj nur el la aŭtografitaj ekzemploj. La signon X legu: diference de...

La signoj estas skribataj hardike:

esperantistoj montros ankaŭ la praktikan valoron de Esperanto en la batalo por noblaj ideoj, kiaj estas la paco kaj libereco, rajto kaj justeco, rajto pri konvena vivnivelo kaj rajto pri laboro kaj klerigo ne nur per la blank-, sed ankaŭ por la kolorhaŭtuloj. Sole per tiu ĉi kategoria postulo, kiu aŭdiĝos el la Pariza kongreso, ni plenumos la mesaĝon de la granda aŭtoro de Esperanto D-ro Zamenhof, kiu taskas al ĉiuj esperantistoj batali por la paco en la mondo. Per informado de la vastaj popolamasoj oni povas la pacon savi, kaj tial organizu publikaĵn paroladojn pri la temo: „La esperantistoj kunhelpas batali por tutmonda paco“. Mi estas konvinkita, ke ankaŭ nia ĉirilata eta laboro estas tre utila por la afero de la paco, pri kiu oni devas paroli kaj por kiu oni en la Esperanto-kluboj devas labori. La militprovokantoj preparas novan, ankoraŭ pli teruran militon, por savi siajn grandegajn enspezojn el la permilitaj profitoj, por povi ankoraŭ pli multe sklavigi la popolon en ĉiu lando. Ilia mamona internaciismo haltigos ilin antaŭ neniu krimo, kaj tial la popolo de ĉiuj landoj devas starigi sin kontraŭ ilin en densaj vicoj, kaj en tiuj la esperantistoj ne povas manki.

Iniciatu porpacan agadon en ĉiu vilaĝeto, en la urbcj, en fabrikejoj kaj uzinoj, organizu manifestaciojn por la paco, preparu imponan manifestacion porpacan kun marŝo tra la stratoj de Parizo okaze de la Universala Esperanto-Kongreso! Se vi ĉion ĉi faros, vi nur plenumos vian devon de esperantisto kaj vi akiros meriton pri la masonado de paco en via patrolando, kaj sekve en la tuta mondo. Samtempe ĝi estos la plej fruktodona laboro por Esperanto, por la esperantistoj de ĉiuj landoj.

1. Konsonantoj: b, c, ĉ, d, f, g, ĝ, h, ĥ, j, ĵ, k, l, m, n, p, r, s, ŝ, t, v, z. — La montriloj montras direkton de skribado.

Ĉi tiuj signoj ne prezentas kompletan stenografian konsonantaron. La ceteraj signoj estas pritraktataj sinsekve. Skribado de vokaloj.

2. „A“ estas unusola dikigita el fundamentaj signoj. Komence de la vortoj ĝi estas skribata normale: am. Post konsonantoj ĝi estas simboligata tiamaniere, ke oni dikigas la signon de la antaŭa konsonanto: kamarado, ŝakala. — Notu: Post „ŝ“ estas la linio 2 konsiderata kiel la baza. — Por „ja“ estas aparta signo.

3. „E“: Komence kaj fine de la vorto ĝi estas simple alkröcigata: ero, ema, avare, parade. Meze de la vorto: se oni skribas konsonant-signojn simple unu apud la alia sur la sama linio, do oni legas inter ili „e“: severe.

4. „I“: Komence de la vorto oni tiras vertikalan strekon de la linio 1 supren kaj la sekvantan signon oni skribas sur la supozata dividita linio: idealo. Meze de la vorto ĝi estas simboligata tiel, ke la signo, post „i“ sekvanta, estas skribata je ½ ŝtupo pli alte: hezitema. Fine de la vorto ĝi estas simple alkröcigata: balai.

En la unua silabo ĝi povas esti simboligata tiel, ke oni skribas la unuan konsonant-signon sur la dividita linio kaj la sekvantaj signoj sekvas sur la baza: dividi. Tio ne povas okazi, se en la dua silabo sekvas signo malpli granda ol 1 ŝtupo: ligi, kisi, vino, cikado, virino.

5. „O“: Komence de la vorto ĝi estas skribata normale: oferi. Se sekvas signo malpli granda ol 1 ŝtupo, do tiu ĉi signo estas skribata sub la linio 2: olivo, orelo. Meze de la vorto ĝi estas skribata tiel, ke la signo, post „o“ sekvanta, estas distancigata proksimume je 1 ŝtupo de la signo antaŭa. Pri signoj malpli grandaj ol 1 ŝtupo validas la sama regulo kiel jam dirite: kotonno. Fine de la vortoj ĝi povas esti ellasata, kiel jam sciante. Tamen, se necese, oni devas en la akuzativo de singularo diferenci ekz.: teron X terno.

6. „U“: Komence de la vorto oni tiras vertikalan strekon el distanco de ½ ŝtupo de sub la baza linio supren: uzino. En la unua silabo ĝi estas simboligata tiel, ke oni malsuprenigas la konsonant-signon je ½ ŝtupo sub la bazan linion: zumi, lulilo. En la mezo de la vorto estas la sekvanta signo distancigata de la antaŭa tiom, kiom ĉe „o“, sed ĝi estas samtempe malsuprenigata je ½ ŝtupo: resumo. Signoj malpli grandaj ol 1 ŝtupo restas sur la sama linio kiel la antaŭa signo: latuno. Fine de la vorto

1. *(Musical notation)*
 2. *(Musical notation)*
 3. *(Musical notation)*
 4. *(Musical notation)*
 5. *(Musical notation)*
 6. *(Musical notation)*
 7. *(Musical notation)*
 8. *(Musical notation)*
 9. *(Musical notation)*
 10. *(Musical notation)*
 11. *(Musical notation)*
 12. *(Musical notation)*

-1-

13. *(Musical notation)*
 14. *(Musical notation)*
 15. *(Musical notation)* 16. *(Musical notation)* 17. *(Musical notation)*
 18. *(Musical notation)* 19. *(Musical notation)*
 20. *(Musical notation)* 21. *(Musical notation)* 22. *(Musical notation)*
 23. *(Musical notation)* 24. *(Musical notation)*
 25. *(Musical notation)* 26. *(Musical notation)*
 27. *(Musical notation)* 28. *(Musical notation)*
 29. *(Musical notation)*
 30. *(Musical notation)* 31. *(Musical notation)*
 32. *(Musical notation)*

-2-

32. *(Musical notation)* 33. *(Musical notation)*
 34. *(Musical notation)* 35. *(Musical notation)*
 36. *(Musical notation)* 37. *(Musical notation)* 38. *(Musical notation)*
 39. *(Musical notation)* 40. *(Musical notation)* 41. *(Musical notation)* 42. *(Musical notation)*
 43. *(Musical notation)* 44. *(Musical notation)* 45. *(Musical notation)*
 46. *(Musical notation)* 47. *(Musical notation)* 48. *(Musical notation)* 49. *(Musical notation)*
 50. *(Musical notation)* 51. *(Musical notation)*
 52. *(Musical notation)* 53. *(Musical notation)*

-3-

54. *(Musical notation)* 55. *(Musical notation)* 56. *(Musical notation)*
 57. *(Musical notation)* 58. *(Musical notation)*
 59. *(Musical notation)* 60. *(Musical notation)* 61. *(Musical notation)*
 62. *(Musical notation)* 63. *(Musical notation)* 64. *(Musical notation)*
 65. *(Musical notation)* 66. *(Musical notation)* 67. *(Musical notation)* 68. *(Musical notation)*
 69. *(Musical notation)* 70. *(Musical notation)* 71. *(Musical notation)*
 72. *(Musical notation)* 73. *(Musical notation)*
 74. *(Musical notation)* 75. *(Musical notation)* 76. *(Musical notation)*
 77. *(Musical notation)* 78. *(Musical notation)*
 79. *(Musical notation)* 80. *(Musical notation)*
 81. *(Musical notation)* 82. *(Musical notation)*

-4-

13. Longaj „l”-signoj.

La samaj signoj, kiel d'rite en la antaŭa alineo, povas esti plilongigitaj de la linio 3 ĝis je 1 ŝtupo sub la linio 1: Ĉi tio signifas, ke oni legu post la koncerna konsonanto literon „l”: fl, pl, ŝl; floro, pledi, floro, apliki, ŝlosilo. — Noto: Por „bl” estas aparta signo (vidu pli poste).

14. Longaj „n”-signoj.

Por legi antaŭ konsonantsigno la konsonanton „n”, oni plilongigas la konsonantsignon de la linio 2 ĝis la linio 4: nf, nĉ, nm, nŝ, nv, nz; danci, tranĉi, recenzi, envio, envia. — Notoj: Por „nd” kaj „nt” estas apartaj signoj. — Longajn „v”-signojn oni aliformigas per rompo. Se estas necese la signon samtempe dikigi, oni dikigas la parton post la rompo (vidu: envia). — Post „ŝl” kaj „nŝ” oni skribas sur la baza linio.

15. Simplaj konsonantgrupoj.

Se renkontiĝas du konsonantoj (inter kiuj staras neniu vokalo), oni devas la duan signon malsuprenigi je ½ ŝtupo: korpo, polvo, karbo, albana, edzo.

Specialaj signoj por diversaj litergrupoj.

Por certaj litergrupoj estas specialaj signoj:

16. „Bl”: ebla, blua.

17. „Ja”: maja, Japanujo.

18. „Je”: kajero.

19. „Nd”: ndr, ndl; kandelo, cindro.

20. „Nt”: kantanta.

21. „Sk”: skarabo, skio.

22. „St”: str, stl, nst; striko, strio.

23. „Ŝt”: kaŝtano, poŝto.

24. „Ks” kaj „kz” estas skribataj egale; la signon ne estas eble aliformigi, do oni skribas: ksia. Ekzameni, fleksebla.

25. „Ŝv”: ŝveli.

26. „p” skribita per maŝo. Post signoj, finantaj je „arketo”, kaj post d, z, ĵ, oni povas skribi la konsonanton „p” per maŝo, kiu estas ½ ŝtupo alta: mp, tempo, papilio, pupo, ŝrapnelo, mapo.

27. „B” skribita per maŝo. Simile povas ankaŭ „h” esti skribata per maŝo, sed 1 ŝtupon alta: mb, tomo, simbiozo, abstrakta, dubi.

28. Mezgranda „g” estas uzata por signoj gl, gr kaj ng, kaj ankaŭ, s „g” devas esti malsuprenigita post signo „u”: grafo, lango, lanugo, pinglo. — Noto: La longajn „l”-signojn oni povas nek suprenigi, nek malsuprenigi.

29. Por mezgranda „k” validas similaj reguloj: kr, kl, nk; klaĉi, blankigi, kaduka, krio. La mezgrandan „k” skribu ankaŭ ĉiam, se antaŭ la konsonanto „k” staras vokalo „e”: leki, ekkoni. Noto: Se post iu longa „l”-signo, kiu finas sub la baza linio, sekvas longa „n”-signo, do skribu tiun ĉi „n”-signon nur sub la baza linio: ekz. flanko.

30. „Gv”: ngv, gvidi, gvidanto, lingvo.

31. Kunfandiĝa „r”. Signoj havantaj „arketon” povas kunfandiĝi kun speciala „r”-signo: pordo, arĥi-, maro X Mario, fermi X firma, ĉarma, murdi, gurdo, areo, aero, (paĝo 3) ilaro, ĉambro X hara, nombra. La kunfandan „r” ne estas eble dikigi. Atentu la lokigon de la kunfandiĝintaj signoj: ĝi ĉiam direktiĝas laŭ la „r”, kiu havas tiun lokon, kiun havas la normala „r”; la sekvanta, kun „r” kunfandiĝinta signo, submetiĝas (en vortoj fermi, firma, ĉarma). Nur kiam en la unua silabo estas „u”-signo malsuprenigita, do la sekvanta „r”-signo staras sur la baza linio (murdi, gurdo). En grupoj rd, rĥ, rm, rt la „r” estas kontraŭstarigebla: partio, monarĥio, gvardio. — Noto: Longaj „r”-signoj povas esti malsuprenigitaj maksimume je ½ ŝtupo.

32. La longa „t” estas speciale uzata fine de la vortoj. (Antaŭ ĝi oni povas ofte ellasi la vokalon „e”): merkato, skolto, koto, poeto.

33. Post signoj finiĝantaj pinte la konsonanto „v” estas skribebla per trastreko: trankvila, favora, tavolo, kvanto, kvereli X kava. — Noto: Du dikajn signojn ne estas eble skribi unu tra la alia (kava); simile ankaŭ ĉe la „maŝaj” b kaj p.

34. Se la „ŝ” estas en la unua silabo malsuprenigita, skribu la sekvantan signon sur la baza linio: ŝuisto, ŝaŭmi.

35. „S”. Komence de vortoj, se post „s” sekvas konsonanto, la „s” estas skribata en alia direkto ol kutime: scienco, sfero, sklavo, skrapi, sveni, Svisujo, slavo. Kun „n”, „m” ĝi estas skribata „kuntuŝe”: snobo, smeraldo. Por grupo „sl” meze de vorto vidu ekzemplon: Ĉeosllovakio. En vorto „spasmo” atentu la grupon „sp” kaj lokigon de grupo „sm”.

36. Renkontiĝoj de signoj „s” kaj „g”: oni skribas aŭ la malgrandan, aŭ la mezgrandan „g” (tiun ĉi post „e”): sigelo X segilo, signo X desegni.

37. Ekzemplo de enmetado de „l”: perlo.

38. Enmetado de „g”: zorgi, organismo.

39. Grupo „aj” povas ofte esti skribata kiel „aj”: majstro, najbaro, novaj, karajn.

40. En grupo „ntr” oni ne uzu la signon „nt”, sed „tr”: ventro.

41. Simile „nkr”: ankro.

42. „Kc”: akceli, akcio.

Verbfinaĵoj -as, -is, -os, -us.

En verbfinajoj oni skribas „malfermitan” „s”:

43. „-os”: lumos, venkos.

44. „-us” ridus.

45. „-as” estas skribata dumaniere: post signoj kun „arketo” ĝi estas kurbigata maldekstren: as, rabas, legas. Post signoj pintaj kaj d, z, nd, k, s. kiel en -os kaj -us: dancas, brodas.

46. Finaĵo „-is” estas pritraktata simile: naŭzis, fiŝis, semis, celis, ĝojis X ĝojas.

47. Grupo -tos ĉe fino de verboj: elektos.

48. Grupo -tas ĉe fino de verboj: balotas.

49. Grupo -tis ĉe fino de verboj: kaptis.

50. Grupo -tus ĉe fino de verboj estas skribata normale: batus.

Substantivaj finaĵoj.

51. „-ojn”: plumojn, kampojn.

52. -toj: botoj, trajtoj.

53. -ton: bapton, doton, lakton.

54. -tojn: demokratojn, zelotojn.

Diversaj sufiksoj.

55. -ito: deputito.

56. Signo por -ti, -iti, -eti: kapti, heziti, meti, konstati X servuti. — Noto: Post „u” la signo ne estas uzbla.

57. -oti: baloti, dorloti.

58. -(i)tiva: aktiva.

59. -(i)tivo: adjektivo. — Noto: La grupon -dje- estas eble skribi kiel -die-.

60. -(i)tiye: pozitive.

61. -eco: riĉeco.

62. -teco: frateco.

63. -(i)tiveco: aktiveco.

64. -(i)tiko: butikoj, praktiko.

65. -(i)tismo: spiritismo.

66. -toro: diktatoro.

67. -turo: fakturo.

68. -ĉj-: paĉjo.

69. -nj-: panjo.

70. -grafo: pantografo.

71. -grafio: stenografio.

Diversaj prefiksoj.

72. dis-: diŝjeti, disetendi, disaŭdigo.

73. eks-: eksministro, eksprezidanto.

74. mal-: malĝentila, maljuna.

75. aŭto-: aŭtomobilo.

76. imp-: imperiestro.

77. in-: insisti, infano.

78. inter-: internacia.
 79. intel-: inteligenta.
 80. kom-: kompreni, komunismo, komparativo.
 81. kon- (ne kiel vortradikolo!): koncerto, konkuri, konveni.
 82. tele-: telefono.

Sigloj. (paĝo 5)

1. al; 2. ali-a, -e; 3. almenaŭ; 4. ankaŭ; 5. ankoraŭ; 6. anstataŭ; 7. antaŭ; 8. apenaŭ; 9. apud; 10. baldaŭ; 11. bona, nebona, malbona; 12. certa, necerte; 13. cetera, -e; 14. ĉar; 15. ĉe; 16. ĉi; 17. ĉiel; 18. ĉie; 19. ĉirkaŭ; 20. des, des pli; 21. devi, ne devi; 22. dum; 23. ekster; 24. el; for; 25. en; 26. Esperant-o, -a, -e, -isto, -ujo; 27. est-i; -as, -is, -os, -us, -u, -anta, -inta, -onta, ne esti, ne estas, ne estos, ne estis, ne estus, ne estu, ne estanta, ne estinta, ne estonta, ne estante; 28. granda, malgranda; 29. ĝenerale; 30. ĝis; 31. havi, havas, havis, havos, ne havanta, ne havinte; 32. ia, ial, iam; 33. ie, iel, ien, ies, io, iom, iu; 34. inter; 35. jes; 36. ĵus; 37. kaj; 38. ke; 39. kelk-; 40. kiel; 41. kiom; 42. koncerne, koncerne tion; 43. konstant-a, -e; 44. kontraŭ; 45. krom; 46. kun; 47. kvankam; 48. kvazaŭ; 49. la X l'; 50. mem; 51. mult-e, -a; 52. neeble; 53. nek; 54. neniam; nenia, nenia, nenia, nenie, nenien, neniel, nenies, nenio, nenicm, neniuj; 55. nepre; 56. nun; 57. nur, nura; 58. ofte, ofta; 59. okazi; okazaĵo, okazintaĵo; 60. per; 61. plej, pli; 62. po; 63. por, por ke; 64. post, poste; 65. pov-i, -o, -as, -is,

-os, -u, ne povonta, ne povinta, ne povanta; 66. precipe; 67. preskaŭ; 68. preter; 69. pri; 70. publika; 71. re, reen; 72. reciprok-a, -e; 73. respubliko; 74. rilate, rilate tion; 75. sama; 76. sed; 77. sen; 78. sinjcr-o, -ino; 79. sola, sole; 80. sub; 81. ne sub; 82. sufiĉe; 83. super, supre; 84. sur; 85. tamen; 86. tial; 87. tiel; 88. tio, ĉi tio, tio estas; 89. tiom; 90. trans; 91. tuj; 92. tuta; 93. vi, vin; 94. kiom da, tiom da; 95. tie ĉi; ĉi tie; 96. tia ĉi, ĉi tia; 97. tiu ĉi, ĉi tiu; 98. tio ĉi, tion ĉi.

Kunligado de artikolo „la“ kun prepozicioj:

99. el la; 100. en la; 101. de la X de l'; pri la X pri l'; ĉe la X ĉe l'.

La prepozicioj (el, en, sur, pri, k. s.) estas laŭeble ĉiam kunligataj kun la sekvanta vorto.

Ne-Esperantaj literoj

por skribado de propraj nomoj: Quebec, Xerxes, Mary, land, Wimbledon, Harwich. Supersignojn skribu kiel en la ordinara skribo.

La apostrofon

se necese, skribu kiel en la ordinara skribo (ĉu ĉe substantivoj, ĉu ĉe la artikolo l').

La provteksto

prezentas § 16 de raporto pri agado de EAĈSR (iom mallongigita; vidu „Esperantista“, 1948, pĝ. 28.).

SCIIGOJ

Nova radio-kalendaro de Praha

Ĉiutage: 15.45—16.00 h. 25.34 m (11840 kc) bulteno.
 22.00—22.15 h. 31.41 m (9550 kc) bulteno,
 dimanĉe rad'ofilmo.

Lundo: 22.50—23.00 h. 470.2 m. Parolado.
 Merkredo: 22.50—23.00 h. 470.2 m. Parolado.
 23.00—23.30 (24.00) h. 470.2 m, Brno
 314,8 m. Verda Stacio, nur la unuan merkredon.

La hor'stemo estas mezeŭropa.

Transmaraj legartoj, bv. noti, ke la ordo 25 34 m estas aŭdebla ankaŭ en Atlantiko, sur la bordoj de Sudameriko, en Afriko kaj Azio. (jm)

Ankaŭ SAT-misiisto. — La gek-doĵ de Plzeň sukcesis alveni al Ĉeĥoslovakio nederlandan SAT-anon, k-ĉon Cor de Waart el Amsterdamo. Antaŭ lia forveturo el Nederlando multaj homoj vol's timigi lin rakontante pri transportoj al Siberio, ĉeĥoslovakaj koncentroj ktp. Cor de Waart estas jam la trian monaton en Plzeň, kie li labor's ĉe granda ŝtata konstruentrerreno kiel ĉarpentisto, kaj estas kontenta. Hodiaŭ li ridas pri la nederlandaj monstraĵoj kaj diras: „Jes, ĉe ni oni iras malsupren de iam bcneĝa vivnivelo, sed vi, ĉeĥoslovakoj, iras de jama malalta vivnivelo konstante supren.“ K-do Cor de Waart fariĝis nia viva propagandilo. Posttagmeze kaj vespere, kiam li estas libera de sia ĉiutaga okupo, li parolas en neesperantistaj kunvenoj esperantlingve pri la vivo kaj batalo de la nederlanda laboristaro kaj neniam li forĝas rekomendi al siaj atentaj aŭskultantoj la ŝravecon kaj nepran recesen de internacia interkompreniĝo per Esperanto. Jam multajn aŭskultantojn li sukcesis interesigi pri nia ideo kaj silentaj restas la skeptikuloj, kiuj asertis, ke Esperanto ne taŭgas por interkompreniĝo. Kontraŭ pago de 500,— Kĉs ni povas pruntedoni k-ĉon Cor de Waart al aliaj ĉeĥoslovakaj urboj. (R. Burda, Plzeň)

Esperanto-taĝo en Háj ĉe Opava sub protekto de la loka Popola Akademio okazos la 21-an de majo 1950. La festeno havos jenan programon: 1. Forveturo de vagonaro el fervojstacio Svinov al Háj je la 6.43 h. Forveturo de vagonaro el Opava al Háj je la 7.09 h. 2. Je la 8-a h. Diservo kun pred'ko en rom-katolika preĝejo. 3. Je la 9-a h. Inaŭguro de Esperanto-ekspozicio. 4. Je la 10-a h. Laborkunveno de esperantistoj el la Ostrava-regiono. 5. Je la 12-a h. Komuna tagmanĝo. 6. Je la 13-a h. Ekskurso sur morteton Ostrá Hôrka al memorŝtono, kiu estas por ĉiu sileziano historie tre memorinda kaj sankta. Poste sekvos ekskurso en belegajn arbarojn, kiuj etend-

iĝas ĉe Háj. 7. Je la 17-a h. Artvespero, post ĝi libera amuzo kun muziko kaj dancado. — En Háj est's antaŭ nelonge fondita loka grupo de EAĈSR, kies anoj estas ĉiuj ĝejunuloj. Nun estas tie gvidataj de s-anino Jaroslava Sichová ĉe Popolaj Akademioj 2 E-kursoj kaj unu kurso de Esperanto en proksima vilaĝo Štítina. En tiu ĉi s'lezia regiono okazis la plej teruraj kaj furiozaj bataloj ĉe la fino de la dua mondmilito inter Germanoj kaj niaj liberigintoj Ruĝaj armeanoj. Pro tio estus tre dezir'nde, ke tiun ĉi Esperantan taĝon vizitu ankaŭ samideanoj el aliaj lokoj de ĈSR, ĉar ilia partopreno forte subtenos la promese evoluantan Esperantan movadon en t'u ĉi vilaĝo sub Ostrá Hôrka, kiu estas tre signifa en la historio de ĉeĥa Silezio kaj kie naskiĝis patro de la nacia artisto Petr Bezruč. (V. S.)



Internacia Kulturo. La jamajn abonintojn kaj novajn interesulojn ni informas, ke ni ne povas ankoraŭ d'ri la koston de la atono por 1950. La eldonejo fiksas la abonpagon de 100 Kĉs, sed Orbis en Praha, kiu posedas la monopolon por importado de ĉiuj eksterlandaj revuoj, kaj pere de kiu ni devis mend'i Internacian Kulturon, reĝule postulas ap'pagon, iam tre altan. Nur post ricevo de fakturo de Orbis ni povas sciigi definitivan prezon kaj tiam ni postulos eventuale alpagon de tiuj, kiuj jam pagis po 100 Kĉs.

Esperantologio. Anstataŭ la originala abonprezo de 250 Kĉs ni devis postuli de la abonintoj 450 Kĉs, la diferenco estas kosto de Orbis. Kiu pagis al ni 250 Kĉs kaj ne ricevis la ĝis nun aperintan unuan kajeron de tiu revuo, skribu al ni tuj, ĉu li deziras aboni la Esperantologion por 450 Kĉs. Bonvolu sin ankaŭ anonci novaj interesuloj. Ili ricevos de ni informon, ĉu ni povos al ili liveri Esperantologion.

Literatura Mondo. Ni ripetas: Literatura Mondo ne aperos dum 1950. Pri la mankantaj numeroj de la jarkolekto 1949 ni sciigos ankoraŭ la abonintojn.

Ni ne povas prizorgi aliajn eksterlandajn Esperanto-revuojn.

Hovoriĉe esperantsky

od Julie Šupichové (28 Kĉs plus 2,50 porto) je kniha, kterou vřele doporučujeme vedoucím kursů, zvláště pro pokročilé. Velmi pomůže žákům nabytí zběhlosti v esperantské konverzacii. Objednávejte hromadně.

VIII. SJEZD ČS. ESPERANTISTŮ V BRNĚ

Přečtěte si pozvání s programem, otištěné na 1. straně minulého čísla. — Sjezd se koná o svatodušních svátcích (27. až 29. května) v Brně. Proti původnímu oznámení koná se ve Společenském domě Zbrojovky pouze seznamovací večer, jinak celé jednání sjezdové bude v budoucím Stadionu na Leninově třídě. — Účastníci sjezdu mají 33 % slevu na dráze (přes 100 km i na rychlíku) na průkazku, kterou přihlášeným zašle přípravný výbor. — Sjezdový příspěvek je 50 Kčs, platí jej i rodinní členové. — Vyplňte ihned přihlášku (i složenku), která byla přiložena k minulému číslu. Objednejte si ihned ubytování. Počet hotelových pokojů potřebuje přípravný výbor vědět pokud možno do 10. května. Ceny uvedené v přihlášce sjezdové platí pro jednu noc. Udejte přesně, na kolik nocí objednávejte nocleh. Pro každého účastníka vyplňte samostatnou přihlášku. — Na přihlášce označte, kterého výletu se chcete zúčastnit. Uspadněte tak přípravnému výboru obstarání potřebného počtu autobusů a parníků. — Očekáváme, že v hojném počtu se zúčastní i esperantisté ze Slovenska, jelikož se současně koná výroční schůze Slovenského Esperanto-Societo. — Uspadněte si cestu, přihlásíte-li se do rezervovaných vagonů a to: účastníci ze sv. Čech u Fr. Patery, Britská 42, Cheb, ze sv. Čech u Fr. Pytlouna, Zámeňova 1010, Hradec Králové, ze sev. Moravy u Vlad. Slaného, Kútuzovova č. 29, Ostrava-Vítkovice, z Prahy u Svazu, Malá Štěpánská č. 7, Praha II. — K provedení zábavního programu na seznamovací večer se přihlásili esperantisté z Brna, Hradce Králové, Týniště n. O. a Ostravy. Program je stanoven, další účinkující nelze již přijmouti. — Na shledanou v Brně v sobotu dne 27. května!

Ústřední výbor sděluje:

Před sjezdem: § 13 svaz. stanov stanoví: Nejvyšším rozhodujícím orgánem svazu jest sjezd, kterého se účastní jednak volení zástupci místních odboček, jednak jednotliví členové. Volba zástupců provede se na valných nebo členských schůzích místních odboček buď hlasovací (je-li volba jednomyslná) nebo hlasovacími listky. Současně se volí i stejný počet náhradníků. Zástupci a náhradníci jsou voleni pro každý sjezd zvlášť. Volení zástupců místních odboček mají tolik hlasů, kolik má odbočka členů. Odbočka může zvoliti za zástupce i takového člena svazu, který není jejím členem. Zástupci vykazují se plnými mocemi, ověřenými odbočkovým výborem s udáním počtu členstva, který zastupují, jakož i hlasů jim udělených, vysílá-li odbočka více zástupců. Členové svazu, kteří nejsou členy některé místní odbočky, mohou se dáti zastupovati na sjezdu jiným členem tak, že ho písemně pověří. — (Tento postup jest dodržeti.)

Zveme Vás .

na letní kursy esperanta v Karlových Varech

Od 9. do 22. VII.: Kurs esperanta pro začátečníky.

Od 23. VII. do 5. VIII.: Konversacia kurso por progresantoj.

Od 6. do 19. VIII.: Supera kurso por kursgvidantoj.

Denně 4 hodiny vyučování, zbytek dne výlety, účast na lázeňském životě a p. — Výlety do nádherného okolí. — Poplatek za kurs 1.800 Kčs včetně ubytování v pensionu, stravování, kursového, vstupného na kulturní a zábavní podniky kursu a autokarového zájezdu do západočeských lázní. Pro pracující a studující mládež poplatek pro začátečnícký kurs 1.000 Kčs. — Vyučují členové zkušební komise Svazu esperantistů ČSR. O zahraniční účastníky se vyjednává. — Přihlášky přijímá odb. učitel Antonín Reček, Karlovy Vary, Stainovo náměstí 5, kde obdržíte též podrobnější informace.

Krajský výbor Svazu esperantistů ČSR, kraj Karlovy Vary.

Somera kolegio de Esperanto en Doksy 15.—29. VII. 1950

III. zpráva:

Páté letní esperantské kursy Letní koleje esperanta v Doksech (viz též I. a II. zprávu!) předčí letos rozsahem své učební látky, výběrem společenských podniků a odborným vzděláním svých učitelů dosavadní letní kursy, konané tam každoročně od roku 1946.

Celkové kolejně za: kursové (46 hodin), ubytování v soukromí včetně zvýšené ubytovací sazby a obecní dávky, 14denní společné stravování (snídaně, oběd a večeře) v městských komunálních restauracích včetně stravování na výletu, permanentní vstupenku k jezeru, vstupné do společenských a zábavních podniků, odvoz zavazadel od nádraží, poplatků za osvědčení o účasti a jeho poštovné číni 1.494 Kčs. Zájemci o celodenní výlet 23. VII. (hrad Kokořn, Mělník, Řep) současně uhradí za jízdné autokary a vstupné při prohlídkách více o 200 Kčs. Přepatek mládeži za společné dobrovolné ubytování bude vrácen v době kursů.

Vyžádejte si prospekt (s oficiální přihláškou), jenž vyjde po 1. květnu! Počet účastníků je omezen na 200. Přihlášky přijímají se jen do 20. června, nebude-li uvedeno počtu již dříve dosaženo. O slevu na drahách bude žádáno. Veškeré platby čiňte blanco-složenkou neb platenkou poštovní spořitelny na šekový účet č. 729.501 Okresní spořitelny a záložny v Doksech s poznámkou „Letní kolej esperanta“! Podmínky soutěže III. květinových her a I. řechnických závodů L K E D budou sděleny později. — Informace o L K E D 1950 podává její jednatel p. K. Šolc, Mladá Boleslav I-41. Další zprávy v prospektu a v časopisech „Esperantista“, „Esperantisto slovaka“ a „Verda Voĉo de Doksy“.

L. K. E. D.

ESPERANTISTA VIVO

Mortis Rudolf Halža, studento 21-jara, en Háj ĉe Opava, la 17. III. 1950. Ĉe entombigo ĉeestis esperantistoj el Háj, Opava kaj Ostrava, en ilia nomo adiaŭis la junan samideancan ĉeĉie kaj esperantlingve Vlad. Slaný.

Mortis sinjorino Kremerová, edzino de nia ŝatata membro A. D. Kremer en Košice, la 3. IV. 1950. Ŝi estis 70-jara. La edzo akceptu esprimon de nia profunda kondolenco.

Mortis Karel Holeček, distrikta peranto en Jaroměř II, sindona gvidanto de la movado en la regiono, pro motorcikla akcidento. La enterigo okazis la 5. IV. La familio akceptu nian elkoran kondolencan.

II. letní kursy esperanta v Rožnově p. Radhoštěm

v klínu Bezkyd,

budou letos od 15. do 29. července.

Program kursů:

1. Kurs pro začátečníky.
2. Kurs pro pokročilé.
3. Supera kurso por kursgvidantoj.

Přihlášky přijímá a informace podává:

s-anino Marie Skařupová, Ostrava I, ul. 1. máje 104.

Město ve znamení ohně

Okresní rada osvětová na Kladně nás žádá o otištění této zprávy: „Kniha M. Majerové: „La urbo sub la signo de fajro“, která měla vyjít v prosinci 1949, pro technické potřeby vyjde později. Přihlášeným zájemcům bude pak zaslána. Prosíme, neurgujte ji!“ — Dále: „Kdo poslal objednávku na knihu Majerové: „Urbo sub la signo de fajro“ okresní radě osvětové na Kladně a přiložil Kčs 35.— s adresou: J. Th. Joosten, Vlamingstrato 9, Gouda, Holandsko?“ — Zprávu zašlete okresní radě osvětové, Kladno.

Prvý pokus o organizaci esperantismu byl proveden ve sféře čistě jazykové. R. 1905 byl zvolen na prvním sjezdu v Boulogne sur Mer Jazykový výbor, aby kontroloval vývoj esperanta a bděl nad jeho jednotou. Je pozoruhodné, že tento sbor trvá podnes a jeho autorita je stále uznávána. Pojednáváme o jeho historii.

Lingva Komitato Esperantista (LK) kaj ĝia Akademio

En Bulonja kongreso 1905 estis laŭ propono de Zamenhof elektita Lingva Komitato Esperantista (LK) por kontroli la evoluon de la lingvo. Lia celo estis difinata kiel studado de lingvaj problemoj kaj de evoluo de Esperanto kaj konstato de stato, al kiu la lingvo venis. Kiel principo por sintenado de la LK al la evoluo de la lingvo estis proklamita konvinko, ke Esperanto povas kaj devas evolui kiel lingvo natura, do ne artefarite per dekretoj de LK sed per uzado parola, skriba kaj verka. La komitato elektita en Bulonjo havis 102 membrojn el 28 nacioj. Por plifaciligi laboron de la tro grandnombra komitato, estis en 1908 elektita kiel ĝia supera komisiono Akademio, konsistanta el maksimume 18 membroj.

Tasko de la Akademio kaj de LK estis difinita per jena deklaro aprobita per balotado de la LK: „La tasko de la LK estas zorgi pri la konservado de la fundamentaj principoj de la lingvo kaj kontroli ĝian evoluon. Ĝi do esploras ĉiujn lingvajn demandojn kaj solvas ilin laŭ la supraj diritaj principoj. Neniel la Fundamento kaj la Lingva Komitato povas esti baro por la normala evoluo de la lingvo, kiun ili kontraŭe certigas.“

En 1948 estis ŝanĝita la titolo de LK kaj de ĝia Akademio je Akademio de Esperanto, la statuto estis revizita kaj la celo estas difinita en la unua alineo de la § 1-a jene: „La Akademio de Esperanto estas nedependa Lingva Institucio, kies tasko estas konservi kaj protekti la fundamentajn principojn de la lingvo Esperanto kaj kontroli ĝian evoluon.“

La Akademio havas estraron konsistantan el prezidanto, unu aŭ du vicprezidantoj, direktoroj de la Sekcioj kaj ĝenerala Sekretario-Kasisto. La nombro de la Akademianoj estas prefera ĉirkaŭ 40, sed ĝi ne povas esti pli alta ol 50.

La organo de LK estis „Oficiala Gazeto Esperantista“, eldonata de „Esperantista Centra Oficejo“ en Parizo 1908 ĝis 1920; de 1923 estis ĉiujare publikigata „Jarlibro de la LK kaj de ĝia Akademio“. De 1929 ĝis 1933 estis eldonitaj 6 kajeroj de „Oficiala Bulteno“, kiuj estis en 1934 anstataŭitaj per „Oficialaj Sciigoj de la Akademio“.

La ĉefaj publikigitaj laboraĵoj de LK estas: Zamenhofaj vortoj kolektitaj de Wackrill kaj Boulet, Propraj nomoj elektitaj de Bein, Schröder, Moch, Korekto de eraraj tradukoj en Universala Vortaro publikigitaj en broŝuroj rilataj al la angla, franca, germana, pola kaj rusa lingvoj. Vortaro de la Oficialaj Radikoj redaktita de Cart kaj Grosjean-Maupin en 1922, Oficiala Klasika libro de Esperanto entenanta ĉiujn oficialajn radikojn kun nacilingvaj tradukoj (redaktita de E. Grosjean-Maupin). Ĝi aperis en 1924 kun tradukoj franca, angla, germana, en 1927 kun tradukoj itala, hispana, portugala, Enhavas ĉirkaŭ 2850 radikojn, tradukitajn kaj 1200 radikojn ĝenerale kompreneblajn al eŭroplingvanoj.

Oficialaj Aldonoj al la Universala Vortaro aperis en jaroj 1909, 1914, 1921, 1929, 1934, 1935. La komenca nombro de radikoj en Universala Vortaro kreskis tiel el 2723 al la nunaj 4186 radikoj oficialaj.

Laboro pri esperantlingvaj difinoj de oficialaj radikoj kaj fikso de ilia gramatika karaktero komenciĝis en 1938 redaktata de Isbrucker, sed estis interrompita de la milito. Nun ĝi estas reprenota.

Prezidantoj de LK estis sinsekve:

1908—1917 Emil Boirac (1851—1917), rektoro de universitato en Dijon, fama franca filozofo, aŭtoro de la unua Plena Vortaro Esperanto-Esperanta.

1917—1931 Théophile Cart (1855—1931), franca profesoro en Lernejo de Politikaj Sciencoj en Parizo, rimarkinda lingvisto scianta sep lingvojn, aŭtoro de pluraj lernolibroj, el kiuj estas la plej konata „E. en 10 leçons“, tradukita en multajn lingvojn, redaktoro de „Lingvo Internacia“.

1931—1933 John Mabon Warden (1856—1933), skoto, aktuario (asekura matematikisto) ĉe „Scottish Equitable“, „Fellow“ ĉe la fakultato de Aktuarioj, daŭre interesata pri matematikaj problemoj kaj pri stenografio, unu el verkintoj de la „Edinburga Poŝvortaro E“ kaj ĉefredaktoro por „La Sankta Biblio“.

1933—1937 Maurice Rollet de l'Isle (1859—1943), hidrografia ĝenerala inĝeniero de la franca maristaro, direktoro de la Centra Oficejo Hidrografia en Parizo, ĝen. sekretario de Internacia Sciencia Asocio Esperantista, redaktis ĝian Bultenon kaj precipe „Sciencan Fundamentan Esperantan Terminaron“.

1937 ĝis nun J. R. G. Isbrucker (* 1889), inĝeniero nederlanda, aŭtoro de „La evoluo de la telefonio“, redaktanto de difinoj por vortaro de la oficialaj radikoj.

Estas rimarkinde, ke LK sukcesis plenumadi sian malfacilan laboron dum tiu longa tempo sen krizoj kaj ke ĝi nun povis repreni siajn taskojn. Dankon meritas la prezidantoj kun ceteraj funkciuloj kaj la esperantista publiko egale. Tiu fakto ankaŭ estas pruvo de vivanteco de nia lingvo.

Překlad a výklad druhého cvičení:

Akusativem (čtvrtým pádem) se v esperantu vyjadřuje: I. Přímý předmět, na otázku koho? co? (1). II. Směr, na otázku kam? (3), při tom se někdy může předložka „en“ vynechat (4). III. Časový údaj, datum (5). IV. Určení doby, jak dlouho trval nějaký děj nebo činnost, na otázku jak dlouho? (6). V. Míru (7). Číslice v závorce uvádějí větu, která je příkladem:

1. Li vidis belulinon. 2. La birdo flugis en ĝardeno. 3. La birdo flugis en ĝardenon. 4. Li eniris (en) la ĉambreon. 5. Kiam tio okazis? La unuan de februaro. Jaŭdon. 6. Kiom longe vi restos en Moskvo? Tri semajnojn. 7. La ĝardeno estas 20 metrojn longa kaj 15 metrojn larĝa.

Proverboj.

Ne ĉio utilas, kio brilas. — Amo faras ion, sed mono ĉion. — Fino bona, ĉio bona. — Kia demando, tia respondo. — Kia ago, tia pago. — Kia patrino, tia filino. — Kiom da kapoj, tiom da ĉapoj. — Kion oni volas, tion oni povas.

Tato přísloví jsou vzata z „Proverbaro Esperanta“, jež L. L. Zamenhof upravil podle díla svého otce Marka Zamenhova: Frazeeologie rusko-polsko-francouzsko-německá. Druhé vydání z r. 1905 obsahuje 1232 přísloví, má 82 stran.

Naučte se těm příslovím zpaměti! Najděte k nim české ekvivalenty!

Enigmo

Familianoj kunsidis ĉe edziĝa festeno. Diris la avo kortuŝite: „Ho, kia domaĝo, ke la avino ne ĝisvivis tiun ĉi soleŝnan momenton! Ni estus 13!“

Estas tasko decidi, kiom da festenantoj ĉeestis. Naiva leganto pensas, ke 12. Sed ĝi estas eraro. Ĉeestis 11.

Kial?

La avo ne sciis kalkuli.